# *Roger Waters: La blokado kontra? Kubo a? kiel forpreni ?ian domon*




La muzikisto Roger Waters, brita aktivulo kaj fondinto de Pink Floyd, dividas ?i tiujn vortojn en la retoj, kiuj tre bone klarigas, kio okazas en Kubo kaj kion Usono volas atingi.

Se vi interesi?as pri mia domo kaj vi ne povas a?eti ?in, tio estas ?ar mi ne volas vendi ?in al vi, nek  luigi a? ludoni ?in al vi. Do vi enfermas min en mia domo, kaj vi ne lasas min eliri por iri al la superbazaro, apoteko a? banko, kaj vi ne lasas ilin vendi al mi la rezervajn partojn por la a?to a? la motorciklo, kaj aldone al tio, ili nuligas miajn kontojn kaj kreditkartojn.

Post iom da tempo miaj parencoj malesperos, iuj eskapos tra la fenestro ... kaj vi de ekstere komencos krii, ke mi ne kapablas gvidi la kondukilojn de mia domo kaj ke mi estas diktatoro, ke mi suferigas mian familion. ... kaj tiam ili komencos diri, ke la registaro de mia domo estas KRIZA kaj ke la najbaroj havos permeson INTERVENI kaj MORTIGI MIN kun la celo atenti la HUMANITARAN KRIZON de mia familio.

Kompreneble ... vi neniam diros, ke via intereso estas okupi mian domon. Kaj tial vi metis min en ?i tiun KRIZAN situacion kun mia familio.

Fonto: Cubadebate

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/cultura/264047-roger-waters-la-blokado-kontrau-kubo-au-kiel-forpreni-gian-domon

**Radio Habana Cuba**